Informilo de Marto 2015

Numero 15, Marto 2015

Studgrupo pri Lingvoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj planas simpozion en majo 2015

1 marto. “Lingvoj kaj Ekskludo” estas ia titolo de la ĉi-jara simpozio organizota (ĵaŭdon, 7 majo) ĉe Church Center, 777 UN Plaza, de la Studgrupo pri Lingvoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Universala Esperanto-Asocio estas membro de la grupo kaj aktivas por atentigi pri la graveco de lingvoj en la laboro de UN.

La ĉefparolanto en la simpozio estos Fernand de Varennes, Eksterordinara Profesoro ĉe la Universitato de Pretorio (Sud-Afriko) kaj Gastprofesoro ĉe la Universitato de Honkongo. Kiel internacia jura specialisto pri homaj rajtoj kaj la rajtoj de minoritatoj kaj indiĝenaj popoloj, Fernand de Varennes plurfoje aperis antaŭ komitatoj de UN en Ĝenevo kaj de la Eŭropa Parlamento en Bruselo. Li ankaŭ kunlaboris kun la Alta Komisionestro de OSCE pri Naciaj Minoritatoj kaj aŭtoris plurajn dokumentojn de UN (lingvaj rajtoj de inidĝenaj popoloj kaj minoritatoj; prevento de etnaj konfliktoj; politika partopreno de minoritatoj) kaj Unesko (rajtoj de migrantoj). Li kunlaboris en dialoga seminario de juĝistoj de la Afrika Kortumo de Homaj kaj Popolaj Rajtoj. Nunmomente li pretigas praktikan manlibron pri lingvaj rajtoj por la Oficejo de la Alta Komisionestro de UN pri Homaj Rajtoj.

Inter la referaĵoj prezentotaj en la simpozio, pluraj rilatos al la lingvopolitiko de UN kaj pluraj al lingvoj kaj packonservado. La 11 referantoj apartenos al sep landoj: Islando, Britio, Hungario, Francio, Kazaĥio, Ĉinio kaj Usono.

Detaloj pri la simpozio troviĝas ĉe www.languageandtheun.org.

Lastatempa partopreno en UN-kunsidoj

Aldone al regula ĉeestado ĉe la ĵaŭdaj informkunvenoj por neregistaraj organizaĵoj de la Fako pri Publika Informado de UN, reprezentantoj de la Asocio partoprenis plurajn lastatempajn kunvenojn de UN. En februaro, Francesco Maurelli, estrarano de TEJO, la junulara sekcio de Universal Esperanto Association, vizitis Novjorkon por ĉeesti la Junularan Forumon de EKOSOK (la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN) kaj partopreni diskutojn pri la Celoj pri Daŭripova Evoluigo post 2015.

Esperanto denove inter la novaĵoj

Post la atento dediĉita al Esperanto en la paĝoj de *New York Times* kaj *Wall Street Journal*, nova artikolo pri denaskaj parolantoj de Esperanto aperis en la gazeto The New Republic, sub la titolo (anglalingva) “Kiel estas eduki viajn infanojn parolante Esperanton.” Oni taksas ĉirkaŭ mil denaskajn parolantojn de Esperanto tra la mondo, eta ono de la tutmonda Esperanto-komunumo. La artikolo en *New Republic* troveblas ĉe:
http://www.newrepublic.com/article/121095/what-its-raise-your-children-speaking-esperanto

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041
www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041